


Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2011:2 (mar-apr)

American Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2011:2 (Mar-Apr)



Ĉi-numere:

- Soros resoras
- Kandidatoj al la estraro prezentas sin
- -ujo: ĉu la nova modo?
- New column: For beginners
- kaj multe pli...

NASK: la fama kursaro revenas en nova vesto (pĝ. 4)

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 50, No 2 — 2011:2 (mar-apr)

Redaktisto • *Editor*: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (*American Esperantist*) is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your email/postal address, and a closeup photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.



Usona Esperantisto estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, (ret)poŝtadreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaprigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajna republikigita materialo. Opinioj esprimataj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.



Centra Oficejo • *Central Office*

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • *Direktoro*, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • *President*: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • *Vice President*: Tim WESTOVER

Sekretario • *Secretary*: Steve BREWER

Kasisto • *Treasurer*: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • *Other board members*: George BAKER, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, ROS Haruo, TOR KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING, Julie WINBERG

Forpaso: Iris WILLOW

La Esperanto-Rondeto de Santa Barbara, Kalifornio, bedaŭras anonci la forpason de Iris WILLOW la 27-an de julio, 2010. Ŝi estis aktiva esperantisto dum 31 jaroj kaj havis gravan rolon en regionaj Esperanto-konferencoj. Jen poemo kiun ŝi verkis dum klaso:

*Ŝtormo senfoliigas arbon;
neĝo endormigas teron;
vento senesperige blovas;
urson dormemo allitigas.*

(Raporto de Doroteo HOLLAND)

Verku por Usona Esperantisto!



Ni serĉas aŭtorojn kiuj pretas verki regulajn rubrikojn aŭ ses- aŭ tri-fojojn jare. Se vi volus kontribui, proponu vin kaj via(j)n ideo(j)n al la redaktejo, ĉe:

bulteno@esperanto-usa.org



La jenan foton de sia nova litkovrilo sendis al ni leganto Arlyn KERR. Ŝi skribis: "Mi kreis ĉi tiun peploman artaĵon el miaj malnovaj t-ĉemizoj. La sola problemo estas, ke nun mi devas aĉeti pliajn t-ĉemizojn por porti!"

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

In the member list, don't publish my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Card verification #: _____ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*


Regional events

For a much longer and comprehensive list of events worldwide, see <http://www.eventoj.hu/2011.htm>.

May 21 – 23 (Kingston, Ontario) *Mid-Canada Gathering (MEKARO)*

The *Mez-Kanada Renkontiĝo* occurs each May in a different Canadian city. MEKARO is a weekend of tourism in Esperanto that provides opportunities to learn about the host city, sample local delicacies (and beer), and make friends with other Esperanto speakers. Kingston was the first capital of Canada, situated midway between Montreal and Toronto. It offers a wide selection of restaurants, tourist sites, museums, and more. For more information, see <http://mekaro.ca>.

June 17 – 20 (Emeryville, CA) *59th National Conference, Esperanto-USA*

This year's *Landa Kongreso* meets right on the San Francisco Bay, next to the impressive Bay Bridge. The theme is "Esperanto: the 'Other' Green Movement".  Although commonly associated with environmentalism, the idea of a green movement has been part of Esperanto for more than a century. Do these two "green" movements have shared interests? Or should Esperanto be just a language, without any social, cultural, or humanist ideals? Come discuss these topics with us in a region at the forefront of both green movements! For more information, see <http://esperanto.org/x/LKUS2011>.

July 2 – 10 (San Diego, CA) *Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)*

The famous North American Summer Esperanto Institute returns to beautiful UC San Diego in a new format. Using only four vacation days, it's ideal for those with limited vacation time and limited budgets! Daily classes with instructors Bertilo Wennergren (Sweden), Birke Dockhorn (Germany) and Lee Miller (USA), talks, games, excursions to local sights, and more! Scholarships are available. See <http://esperanto.org/nask>.

Local groups

Below are contact addresses for some of the larger local groups that meet regularly; for more complete info, see our website.

California

Sacramento: <http://esperanto.org/us/esos>

San Diego: <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

San Francisco:
<http://esperanto.org/us/SFERO>

Santa Barbara: dorothyjeanh@gmail.com

L.A.: <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

Colorado (Longmont) <http://ek-ek.org>

Connecticut (Wallingford) <http://esne.net>

District of Columbia <http://esperantodc.org>

Georgia (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

Hawaii (Honolulu)
<http://esperanto.org/us/Honolulu>

Idaho (Boise) <http://terpomuloj.org>

Illinois

Champaign-Urbana: <http://ekoci.org>

Chicago: <http://esperanto-chicago.org>

Maine (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

Massachusetts (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

Missouri (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

New Jersey (Princeton)
<http://esperanto-nj.tripod.com>

New York

New York: <http://esperanto-nyc.org>

Rochester: <http://esperanto.lodestone.org>

Ohio (Cincinnati) <http://ligileto.freeshell.org>

Texas

Austin: <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

Dallas: <http://esperanto-tx.org>

Virginia (Hampton Roads) <http://bonege.com>

Washington (Seattle)
<http://seattleesperanto.org>

Wisconsin (Madison)
<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

Nova teatraĵo eldonita

Raportas Barry FRIEDMAN

COLUMBUS, OHIO — En la aprila numero de la revuo *Literatura Foiro* aperas la teatraĵo “La Kronikoj de D-ro Hoffman” de leganto Barry FRIEDMAN. Barry esperantistiĝis antaŭ 20 jaroj kaj li fondis la Esperanto-Klubon de Norda Teksaso. Li raportas ke oni jam planas traduki la teatraĵon en la bulgaran, kaj oni ankaŭ enketas pri eventuala surscenigo kaj/aŭ surbendigo kiel radio-teatraĵo, formo nun renaskiĝanta per podkasto. La teatraĵo temas pri nuntempa psikanalizisto, kiu havas tre neordinaran pacienton. Por pli da informo, kontaktu: <bfriedma@chemistry.ohio-state.edu>.

Soros resoras


Raportas Humphrey TONKIN

NOVJORKO — La 12-an de aprilo okazis festo por lanĉi reeldonon de la anglalingva traduko de la Esperanto-verko de Tivadar SOROS *Masquerade ĉirkaŭ la morto*. La verko pritraktas la sukcesan transvicon de la familio Soros en Budapeŝto dum la sistema persekutado kaj mortigo de la hungaraj judoj fare de la naziistoj en la finaj jaroj de la Dua Mondmilito.

La festo, en la hejmo de la financisto George SOROS, filo de Tivadar, kunvenigis grupon de elstaraj intelektuloj de la regiono, inter ili la ĉefredaktoro de *New York Review of Books*, reprezentantoj de *New York Times*, pluraj verkistoj, kaj la konata televida komentariisto Bill MOYERS. Ĉeestis ankaŭ fakuloj pri Esperanto kaj interlingvistiko Esther SCHOR kaj Arika OKRENT. Ĉefa parolanto estis


Humphrey TONKIN, kiu, en sia rolo kiel tradukinto, havis la taskon prezenti la libron kaj paroli pri ĝia ekesto. Tion farante, li kaptis la okazon, antaŭ atenta aŭskultantaro, paroli pri Esperanto kaj ĝia formiĝa rolo en la vivo kaj pensado ne nur de la patro sed ankaŭ de la filoj Soros.

La libro aperis originale en Esperanto en 1965 kaj en dua eldono en la jaro 2000 – la jaro de aperigo (en Britujo) de anglalingva traduko. Poste aperis tradukoj ankaŭ en la germanan, rusan, hungaran kaj turkan, kaj estas en preparo tradukoj en la italan kaj la ĉinan. Usona eldono aperis en 2001; tiun eldonon oni nun ree aperigas en Novjorko ĉe la eldona grupo Skyhorse. George SOROS estis surpriza vizitanto en decembro en lanĉa festo de traduko de alia libro de la patro, *Modernej Robinzonoj*, ankaŭ tradukita de Tonkin (kiel *Crusoes in Siberia*). Tiun feston organizis la grupo Esperanto por UN.



Tivadar Soros.
Masquerade: The Incredible True Story of How George Soros' Father Outsmarted the Gestapo. New York: Arcade. 2011. 275 pĝ.

Tivadar Soros.
Crusoes in Siberia and The Fairest Judgment.
New York: Mondial.
2010. 31+93pĝ.



Geava klubo... sed ne nur por geavoj



Ĉu vi havas genepon por esperantistigi? Ĉu Esperanto jam estas io, kion vi kunĝuas aŭ ne, la “Geava” Klubo ofertas al vi ĉiumonatajn donacojn de ludoj kaj agadoj por lerni kaj distriĝi kune.

Kompreneble, vi ne devas esti vera avĉjo aŭ avinjo por membriĝi: ankaŭ gepatroj, geonkloj, geamikoj estas tute bonvenaj!


(Kaj, se vi ne havas genepon aŭ eĉ kvazaŭ-genepon, vi estas invitataj membriĝi por doni la genepan sperton al infano, aŭ klaso de infanoj, malriĉaj. En tiu kazo, viaj monataj donacoj estos sendataj al la infano aŭ klaso elektita.)

Sendajoj por 2011 inkluzivos: libretojn, ludojn, puzlojn, KD-on, ludilojn, aferojn por kolorigi kaj plenigi, magnetludojn kaj multe pli.

Via membriĝo de Geava Klubo ankaŭ subtenas la kreadon kaj disvastigon de allogaj instruiloj por Esperanto. Aliĝu ĉe: <<http://mondeto.com/geava-klubo.html>>

(Anonco de Penni VOS)

Enigma: solvo de 2011:1



La rekordo daŭre rompiĝas: ĉi-foje venis respondoj de dudek solvintoj! Dankon kaj gratulon al niaj karaj enigmemuloj Arlyn KERR, Dave RUTAN, Alex STEFANELLI, Russ WILLIAMS, Roland THIBAUT, Sally LAWTON, Briĉjo, Walter MURAWSKI, Sofiya SOSKINA, Peter MCCORQUODALE, Cornelius J. MCKOWN, E. James LIEBERMAN, Shāri WEBBER-DUNN, William PECKENPAUGH, Douglas ZANDER, Sandra MILLER, Ray REDD, Ellen EDDY kaj Olga Du TEMPLE. La gajninto ĉi-numere estis **Randy DEAN**. Bis!

(La krucvortenigma revenos venontnumere.)

Senintenca esperantaĵo?



Simono KEITH trovis ĉi tiujn keksojn en Koloradio. Sendube la firmao strebas revigligi la debaton inter uzo de “kuketo” kaj “kekso”...

Kandidatoj al la estraro de Esperanto-USA

Baldaŭ okazos baloto por elekti la novajn estraranojn de Esperanto-USA. Ni petis ĉiun kandidaton sendi sinproponon, kaj ĉi tie ni aperigas tiujn proponojn sen redaktado (krom korekto de etaj tajperaroj). Membroj de E-USA baldaŭ ricevos balotilon perpoŝte.

Por la posteno de Prezidanto:

Orlando RAOLA

Naskiĝis en Havano (1955). Doktoro pri Kemio (UC Santa Barbara, 2005) kaj profesoro pri kemio ĉe Santa Rosa Junior College.



Esperantisto ekde 1984. Ekaktivis en la kuba movado kaj dum kvar jaroj laboris profesie por Esperanto. Ankaŭ agadis internacie: LKKano kaj preleganto por la 75a UK, preleganto en la Internacia Kongresa Universitato de la 88a UK (Gotenburgo). Ekloĝis en Usono en 1994, kaj tuj ekaktivis en la loka (San Franciska golfo), Kalifornia kaj tutlanda movadoj. Prezidanto de LKK por la 47a Kongreso de ELNA, San Francisko (1997). Estrarano de ELNA 1988-2007 kaj denove en 2010 ĝis la nuna momento. Instruis Esperanton dum pluraj jaroj en Kubo kaj antaŭnelonge en la Somera Kursaro ĉe Universitato de Kalifornio San Diego.

Mi kandidatiĝas por la posteno prezidanto de E-USA kun la celo kontribui al la plua disvolviĝo de Esperanto en Usono. Mi volas ke ĉiuj komunikiloj kaj teknikaĵoj nuntempe havebla estu kiel eble plej profitdona utiligitaj por disvastigo kaj plikreskiĝo de homaj rilatoj nialande kaj internaciskale. Samtempe, mi volas gvidi la asocion en la direkton al

plilarĝiĝo de per-esperanta agado en lokaj kaj regionaj organizoj, al pligraviĝo de la internacia rolo de la usona E-movado kaj al plifirmigo de la estonteco de Esperanto en Usono. Mi tute ne volas kaŝi de la elektontoj la fakton ke mi sincere opinias, ke jam estas tempo venigi denove Universalan Kongreson de Esperanto al Usono kaj ke se mi elektiĝos, la realigo de tiu ĉi revo certe troviĝos inter miaj prioritatoj.

Leland ROSS (Haruo ROS?)



Esperantiĝis aŭto-didakte en 1970, kaj formale studis ĉe Univ. de Portlando kaj SFŜU antaŭ resp. post la UK en Portlando 1972. Post senspessa gastado en Svislando en 1973, restas konvinkita kaj aktiva esperantisto ĝis hodiaŭ.

Aktivas en loka (Seatla) movado de post ĉ. 1976. Tradukis verkojn de (i.a.) Melville kaj Thurber en Esperanton, kaj tradukis multajn kaj verkis kelkajn himnojn (14 tekstoj en *Adoru*, inkl. de 3 originaloj). Ŝirmas grandan E-libraron (Biblioteko Culbert) en sia aŭtejo, kaj elmontras 16-lingvan pacfoŝton en la antaŭkurto.

Por la posteno de Vic-Prezidanto:

Bruno DANTAS



Mi estas kuracisto kies plej amata ŝatokupo estas vojaĝi kaj sperti alilandajn kulturojn. Pro plurjara kvazaŭ katenado al medicina studado – dum kiam mankis libereco por eksterlanda vojaĝado – en 2007 mi serĉis ilon, kiu ebligis min sperti alilandajn kulturojn pere de korespondado, radio-elsendoj kaj aliaj “ĉe-hejmaj” eblecoj. Kiam mi malkovris Esperanton tuj evidentiĝis, ke mi hazarde trovis ne nur perfektan respondon al mia eta specifa bezono, sed ankaŭ nepriskribeble valoran kaj belan trezoron, kiu perfekte respondas al universalaj kaj malnovaj homaj bezono kaj sopiro.

Kelkaj monatoj post mia malkovro de Esperanto mi komencis ĉeesti kiel eble plej multajn Esperantajn renkontiĝojn. Mi ekvarbis familianojn, amikojn kaj kolegojn al la internacia lingvo. Mi starigis Esperanto-klubon en Ĉarlestono, SC kie mi loĝis kaj, kiam mi transloĝiĝis al Filadelfio, tie mi senpage instruis Esperanton kaj denove starigis Esperanto-klubon. Mi iĝis regula subtenanto de la brazila orfejo Bona Espero. Mi kelkfoje redaktis artikolojn por Vikipedio kaj Radio Verda. Kvankam mi ĝuis kaj daŭre ĝuos ĉi tiujn malgrandajn kontribuojn al Esperantujo, mi nun pretas fari ion iomete pli grandan: Mi volas havi la plezuron kaj honoron senlace kaj tutkore kunlabori kun miaj amikoj ĉe Esperanto-USA por vastigi konon, lernadon kaj uzadon de Esperanto en Usono.

Phil DORCAS



Mi servis al Esperanto-USA (ELNA) kelkajn jarojn kiel estrarano, vic-prezidanto, kaj prezidanto (la pasintajn ses jarojn). Mi ankoraŭ volas servi laŭ la bezonoj de Esperanto-USA kaj la movado.

Mi komencis lerni Esperanton en 1998. Mi loĝas en Fort Worth, Teksaso. Mi kaj mia esperantista edzino, Elizabeto, aktivas en la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso. Mi volas fari mian parton en kunlaboro kun aliaj por antaŭenigi la movadon, fronti la defiojn, solvi problemojn, kaj realigi niajn revojn pri internacia amikeco, interkultura interkompreno kaj mondpaco.

Dum la pasintaj ses jaroj ni faris kelkajn paŝojn en bona kunlaboro kaj stabileco. Ni ŝanĝis la publikan nomon de ELNA al Esperanto-USA, ni movis la centran oficejon kelkfoje, trovis novan direktoron, trovis novan redaktoron de la organo, plibonigis la retpaĝaron, kaj komencis serion de kongresoj en Usono post kelkaj eksterlandaj kongresoj en Meksiko kaj Kanado. Ni komencis kunlaboron por la oficejo de UEA rilate al la U.N. en Novjorko danke al Nejl BLONSTEIN kaj D-ro Humphrey TONKIN.

Ni faris multajn paŝojn en bona komunikado kaj kunlaboro, sed ĉiam restas multe pli por fari. La pli bona kaj pli forta epoko por Esperanto en Usono atendas nin en la venontaj jaroj. Mi volonte servos kiel eble plej bone laŭ mia kapablo en la estraro, en landaj kongre-

soj, en komitatoj, en internaciaj rilatoj, en regionaj eventoj, kaj en la loka klubo. Mia persona misia deklaro estas “an-

taŭnenigi mondpacon, konstruante pontojn de interkompreno inter la landoj, kulturoj, kaj klasoj de la mondo.”

Por la postenoj de Direktistoj (3 vakaj)

Neil BLONSTEIN

Mi agadas jardekojn por Esperanto ekde mia 16a naskiĝtago kiam mi legis artikolon ĉe World Book Encyclopedia.



Mi laboris kelkajn karierojn: 1. Du jarojn kiel maristo (sub influo de mia patro kiu laboris jardekojn kiel maristo). Tiel mi vizitis plurajn landojn i.a. Roterdamo, Nederlando kaj UEA Ĉef-sidejon. 2. Kvin jarojn mi instruis naĝadon kadre de publikaj lernejoj per la hebrea lingvo. 3. Dek-sep jarojn mi laboris kiel elementa instruisto en Novjorkaj Publikaj Lernejoj. Mi laboris kun emigrantoj el deko da landoj, ĉefe hispanaj. Mi oficiale pensiigis antaŭ jaro.

Dum miaj someraj ferioj mi povis partopreni dekon da internaciaj kongresoj en Europo kaj Sud-Ameriko. Mi ankaŭ partoprenis dekon da naciaj kongresoj kaj similan numeron da regionaj kongresoj. Post kelkaj postenoj ĉe la Esperanto Societo de Novjorko mi elektigis prezidanto de tiu klubo, ĉi-jare.

Mi loĝis en Israelo 11 jarojn kaj en Brazilo dum jaro kaj agadis kiel informanto, ekspozicianto kaj instruisto de Esperanto en tiuj landoj. Mi volatuladis daŭre tri jarojn ĉe la UEA/Novjorko Ofi-

cejo kun kontaktoj kun centoj de enlandaj kaj eksterlandaj politikistoj, UNO funkciuloj, kaj gvidantoj de Ne Registaraj Organizoj. Lastatempe mi renkontigis 3 fojojn kun estrino de UNESCO, Irina BOKOVA, kaj ofertis kunlaboron.

Mi serĉas kunlaboron kun ĉiuj specaj da organizoj, neutralaj, religiaj, kaj politikaj kiuj uzas Esperanton. Mi interesiĝas pri la kulturaj/lingvaj rajtoj de indiĝenoj kaj aktivis en UNO komitato pri tiu temo.

Mi helpis viviĝi Unitarian Esperanto Network per ekspozicioj, skribado ĉe sia Yahoo Grupo, Facebook-paĝo ktp.

(Angla versio - mallongigita)

I have had several careers: 1. Two years as a seaman (under the influence of my father who worked for decades as a seaman). 2. Five years as a swimming instructor (teaching in Hebrew in Israel). 3. Seventeen years as a public school teacher in New York City, working largely with immigrants.

I was employed as a public school teacher in New York City for 17 years.

For 3 years, I have volunteered full time for the UEA, New York Office, having hundreds of meetings with NGO and UN dignitaries. Recently I met 3 times with the head of UNESCO. I have co-organized 2 Zamenhof Symposiums, each with about 75 participants.

Steven CYBULSKI

Esperanton mi eklernis komence de 2008, en enkonduka kurso ĉe la Universitato de Roĉestro. Mi partoprenis en la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) dufoje, unue en 2008 kaj denove en 2010. La semestron post NASK en 2008, mi uzis Esperanton en universitata kurso pri tradukado, angligante du novelojn de Julio BAGHY. Kadre de NASK en 2010, mi sukcesis en la KER-ekzameno je la nivelo C1. Nuntempe, mi regule kontribuas artikolojn al *Usona Esperantisto* sub la rubriko *Efike, Gramatike* kaj estas membro de la laborgrupo kiu renovigas NASK-on.

Se mi estus elektita, mi daŭrigus mian ĝisnunan agadon kaj tre volonte komencus plenumi diversajn taskojn kunlabore kun la aliaj estraranoj. Laŭ mia opinio, ege gravas kaj informado al la ĝenerala publiko kaj servoj al niaj membroj, do mi pretas diligente labori en tiuj kampoj. Aparte interesus min ekokupiĝi pri la ĝisdatigado kaj pliampleksigado de la retejo de Esperanto-USA. Mi volas, ke la retejo estu bonega komencpunkto por usonaj Esperantistoj kiuj serĉas interrete atingeblajn Esperantaĵojn, kaj ankaŭ por neesperantistoj kiuj serĉas fidindajn informojn pri nia lingvo kaj komunumo.



Christine WINGROVE

Mi studas lingvosciencan kaj ekonomikan ĉe la Universitato de Roĉestro en Novjorkio. Ĝenerale mi interesiĝas pri lingvoj kaj tial komencis lerni Esperanton antaŭ 2 jaroj. Ekde tiam, mi ĉeestas k.e.p. ofte kongresojn kaj depende de kie mi estas, partoprenas en aŭ la Esperanta klubo ĉe UR aŭ la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso. En kaj 2009 kaj 2010 mi ĉeestis ĉe NASK kaj pasintjare tie trapasis la KER-ekzamenon je la C-1 nivelo kaj nun estas lingvohelpanto ĉe lernu!

Mia ĉefa espero por Esperanto en Usono estas (re)vigligi la junulan movadon. Mi penas kunigi la junajn Espe-



Senintenca esperantaĵo?



Jen nova komerca marko por aŭtomobiloj de firmao Nissan, fotita de leganto Collin Ivy. Ĉu Nissan intencas vendi nur al tiuj, kiuj jam posedas "ĉefan" aŭton?

rantistojn en la lando: nuntempe mi organizas Skajp-renkontiĝojn kaj esploras la eblon okazigi kunvenojn junulajn ekster la interreto. Por konservi la usonan movadon, necesas allogi novajn membrojn – aparte novajn membrojn junajn. Bonŝance, mi elektis studi kie troveblas Esperantistoj, kaj kie jam ekzistas studenta grupo Esperantista. Bedaŭrinde, estas malmultaj lokoj tiaj. Estas facile trovi retajn ilojn lerni la lingvon, tamen estas malpli facile trovi okazon uzi la lingvon kaj aniĝi la realvivan Esperantujon. Esperanto-USA povas pleniĝi tiun mankon – ekzemple, oferti helpon al tiuj, kiuj volas starigi klubon ĉe universitato; kaj subteni la penojn de USEJ krei ligon inter tiuj kluboj kaj okazigi kunvenojn por enkonduki junulojn al la usona Esperantujo. La Esperantista komunumo jam multe helpis min, kaj mi nun volas kontribui.

Dankon pro la konsidero.

Gary GRADY

Mi estas 60-jaraĝulo kiu uzas Esperanton preskaŭ ĉiutage. Mi estas membro de ELNA/ Esperanto-USA ekde 1976, estras la kapital-investan komitaton kaj estis ses-foje elektita al la estraro. Mi partoprenis almenaŭ 16 jarkongresojn kaj servis en la LKK por la kongreso en Raleigh. Mi estas vicprezidanto de Amerika-Asocio de Instruistoj de Esperanto, respondecas pri ĝia retejo, kaj helpas redakti ĝian bultenon. Mi membras en UEA ekde 1976, partoprenis tri Uni-



versalajn Kongresojn, kaj estas delegito. Profesie mi estas vicprezidanto de softvara firmao.

Jed MELTZER



Mi eklernis E-on je la aĝo 16 kaj ĝuis la benojn de E-o nun dum pli ol duono de mia vivo. Mi estas fanatikulo de la Pasporta Servo kiel gasto kaj gastiganto. Antaŭ tri jaroj, mi ĉeestis la kongreson TAKE kaj decidis, ke mi ricevis tiom multe de E-o, jam estas tempo komenci redoni al la komunumo. Mi agemiĝis en la Esperanto-Societo de Vaŝingtono, kaj estris la LKK-on por la Landa Kongreso en 2010.

Mi nun loĝas en Toronto, Kanado, kie mi laboras kiel cerb-scientisto. Mi klopodas trovi rimedojn mildigi la simptomojn de cerbodifektoj, por trakti la defiojn de nia maljuniĝanta societo. Mi estas dumviva membro de EUSA kaj intencas resti parto de la Usona movado. Mi kredas ke la sukceso de E-o en Usono ege gravas por ĝia daŭra disvastigo en la mondo. Laŭ mi, la plej bona maniero varbi pri Esperanto estas uzi ĝin por niaj propraj celoj, ĉu profesiaj, personaj, aŭ simple plezuraj. Se ni profitas de la lingvo, aliaj homoj rimarkos tion. Do kiel estrarano, mi laboros por trovi novajn manierojn, en kiuj usonaj esperantistoj povas uzi esperanton por riĉigi siajn vivojn.

Participles

It's easy enough to explain what a noun, verb, adjective, or adverb is, but defining *participle* is not so easy. Dictionaries typically say a participle combines traits of an adjective and a verb, but that explanation isn't very clear. It also overlooks the fact that participles can be used as other parts of speech—such as adverbs in Russian and Hungarian. In English, the present participle can be used as a noun, though traditionally in that role it's called not a participle but a gerund.

In English, each verb is associated with just two participles, past and present. The present (or “active”) participle is perfectly regular except for spelling, always formed by addition of *-ing* to the infinitive. The past (or “passive”) participle is usually, but not always, the same as the past tense. Examples of present/past participles include *being/been*, *doing/done*, *eating/eaten*, *loving/loved*.

Participles in Esperanto come in much greater variety. Each verb has three corresponding active participles identified by the endings *-inta*, *-anta*, and *-onta*. In addition, transitive verbs (those that take objects) also have a trio of passive participles ending in *-ita*, *-ata*, and *-ota*. The difference between active and passive participles is that active participles go with the subject, and passive participles go with the object of the verb. (That's why only transitive verbs have passive participles.) For example, the phrase *Li amas ŝin* implies that *li estas amanta* and *ŝi estas amata*.

In addition to three or six adjective participles for a given verb, Esperanto allows participles to serve as nouns and



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgarygrady@frontier.com

adverbs. Given all the possible forms this implies, a student can be forgiven for thinking that English, with its two participles, is simpler.

Of course once you actually start putting participles to use, English turns out to be not so simple after all. The active/passive distinction seems simple enough in the sentences *It was eating* and *It was eaten*. But what about *It has eaten* versus *It was eaten*? Apparently not just the participle but the associated verb can determine whether the meaning is active or passive. Moreover, while you can say *It is eating*, you would not normally say of an action in progress, *It is eaten* but rather *It is being eaten*. Native speakers of English aren't conscious of how complicated this system is until they try to write down all the rules.

Esperanto participles, on the other hand, are richly expressive but pretty straightforward once you understand the basic ideas of how they work. Here's a suggested approach for introducing participles one concept at a time:

Start with the word *Esperanto* itself. Students have probably already been told what it means, so you can treat *-anto* as a simple suffix. You can then mention other examples of words ending in *-anto*, such as *manganto* and *amanto*.

Speaking of *amanto* gives you a reason to bring up the corresponding passive form *amato*. From there it's an easy step

to the corresponding adjectives ending in *-anta* and *-ata*.

Having covered the adjective versions, the next step is adverbs, such as *amante* (“lovingly”). This is a good time to bring up something very common in Esperanto, the participial adverb leading off a sentence, as in *Amante mi rigardas vin*.

Now you can illustrate adding words to make an adverbial phrase. To make it seem more natural, you can start with an English expression (for instance, *Being loved by you, I'm happy*) and its Esperanto translation (*Estante amata de vi, mi felicias*). You can then show how to say the same thing more concisely: *Amate de vi, mi felicias*.

Once the student is comfortable with an adverbial phrase involving a participle, you can bring up the novel idea of a participle taking an object like a verb would, as in *Amante vin, mi sopiras*. Students may have trouble getting their minds around the idea of something other than a verb taking a direct object, so this a good time to stop and explain the mixed properties of participles. I think it's easier to explain something students have already seen than to introduce the abstract idea before they have any practical familiarity with the topic.

Now, having broken the news of participles having verb-like properties, it's natural to show that participles can refer to the past, future, and present by using the same set of vowels already familiar from *-is*, *-as*, and *-os*. As always, practical examples are very helpful, such as: *Leginte vian leteron, mi decidis telefoni vin*.

It's worth saying something about compound tenses. We're so used to them in English that it's natural to look for an

equivalent in Esperanto. But Esperanto isn't English, and students should know that where an English speaker would use a compound tense, in Esperanto it's much more typical to use a simple tense, possibly together with an adverb for clarity or emphasis. The usual equivalent for *I'm thinking* isn't *Mi estas pensanta* but simply *Mi pensas*, and while *I've (already) eaten* could be translated *Mi (jam) estas manĝinta*, in practice one would more likely say: *Mi jam manĝis*.

Still, there are certainly cases when the combination of *esti* and a participle is the best choice to convey a precise meaning. For example, the best translation of the English pluperfect construction *I had eaten* is probably *Mi estis manĝinta*.

Since the verb *esti* can take any of its forms—*esti, estu, estus, estis, estas, estos*—and the participle itself can be past, present, or future, there are quite a lot of possible combinations. It helps to think of them not as a complicated set of compound tenses, but as what they actually are: the verb *to be* linking the subject with a descriptive adjective. E.g., *manĝonta*, being an active future participle, means “yet to eat,” so *Mi estis manĝonta* means “I was yet to eat,” *Mi estas manĝonta* means “I am yet to eat,” *Mi estos manĝonta* means “I will be yet to eat,” *Mi estus manĝonta* means “I would have been yet to eat,” and so on.

There are still some subtle points that could be brought up in a more advanced course, but as a practical matter, this is the bulk of what students need to understand about participles and participial phrases. Beyond this it's mainly a matter of experience and practice. ★

La nova modo: -ujo

[Foje legantoj rimarkas nian konvencion normigi landonomojn per la sufikso -ujo. “Kial vi insistas pri tiu eksmoda sufikso?” ili demandas. “Kial vi preferas uzi la formon ‘Italujo’ anstataŭ ‘Italio’, ekzemple?”

Efektive, temas ne nur pri redaktista kaprico, sed pri strebo al klareco. Bedaŭrinde, -io foje kreas konfuzon pri la sistemo de landonomoj, aparte por lernantoj.

La kialojn elokvente priskribas verkisto Anna LÖWENSTEIN en sia artikolo sube. En 2007 ŝi redaktis la libron “Rusoj loĝas en Rusujo” en kiu aperas eseoj pri -ujo fare de Bertilo WENNERGREN, Paul GUBBINS, Montagu BUTLER, Jorge CAMACHO, kaj aliaj. La libro haveblas paperforme de la libroservo de UEA, kaj ankaŭ rete, en senpage elŝutebla PDF-formo. (Vidu adreson fine de la artikolo.) —Red.]

Kial mi insiste pludiras *Germanujo* kaj *Italujo*, kiam ĉiuj aliaj preferas *Germanio* kaj *Italio*? Nu, pro pluraj kialoj. Parte ĉar -io ŝajnas al mi stranga finaĵo, ne kongrua kun la simpleco kaj reguleco de Esperanto. Pli pri tio poste. Sed plejparte ĉar mi ne eltenas la konfuzon, kiun la finaĵo -io alportis al la landonoma sistemo en Esperanto.

Kia konfuzo? Hmm, kiel klarigi la landonoman sistemon en unu alineo? Mi jam dediĉis al tiu temo tutan libreton. Sed mi faros mian eblon klarigi rapide.

La landonomoj en Esperanto estas dividitaj en du grupoj. Unu grupo sekvas la modelon *Usono*, *usonano*, la alia sekvas la modelon *Britujo*, *brito*. Multaj esperantistoj, kompreneble, preferas uzi -io anstataŭ -ujo, kaj do diras *Britio*. La problemo estas, ke ankaŭ en la unua grupo



Anna LÖWENSTEIN

Anna Löwenstein verkis la romanojn *La ŝtona urbo* (1999) kaj *Morto de artisto* (2008). Ŝi loĝas en Italujo kun sia edzo Renato CORSETTI.

(*Usono*, *usonano*), multaj landonomoj finiĝas per -io, ekzemple *Alĝerio*, *Aŭstralio*, *Namibio*, *Kolombio*. Do, kiam oni renkontas landonomon, kiu finiĝas per -io, kiel scii, ĉu ĝi sekvas la modelon *Usono*, *usonano*, ĉu la modelon *Britio*, *brito*? Tio gravas, kiam necesas formi la nomon de la landano, ĉar en la unua kazo necesas aldoni -ano al la radiko, dum en la dua necesas forigi la -i-.

Kiam la plejmulto da esperantistoj uzis la finaĵon -ujo por landonomoj de la dua grupo, ne estis problemo. Ĉiuj esperantistoj (eĉ tiuj, kiuj preferis -io) sciis, al kiu el la du grupoj landonomo apartenas, kaj do senprobleme sciis formi la nomon de la landano. Sed nun, bedaŭrinde, kiam preskaŭ ĉiuj uzas -io, la distingo inter tiuj du grupoj perdiĝis, tiel ke multaj esperantistoj ne plu komprenas kiel la sistemo funkcias; efektive iuj ne plu komprenas, ke entute ekzistas du-parta sistemo. Rezulte, oni tre ofte renkontas erarajn formojn, ekzemple *aŭstralo* aŭ *Israelio*. (Se vi ne komprenas, kial tiuj estas eraraj, bonvolu legi la pli detalan klarigon en mia libreto *Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto*.)

Sed krome, la finaĵo -io kunportas plurajn aliajn problemojn. Ĉu la -i- estas sufikso? Ĝi ne similas la aliajn sufiksojn en Esperanto, kiuj normale havas la formon V+K (vokalo plus konsonanto) aŭ V+KK. Krome, ĝi kondukas iom mal-

same: malkiel la aliaj sufiksoj oni ne povas uzi ĝin memstare.

La vortelemantoj en Esperanto normale estas kunmetitaj laŭ travidebla maniero. Ni ĉiam emfazas tiun fakton en nia reklamado: kiam ni volas konvinki la homojn lerni Esperanton, ni donas ekzemplojn kiel *mal-jun-ul-in-o* aŭ *nask-iĝ-tag-o*. Tiuj kunmetaĵoj estas facile analizeblaj kaj ĉiu elemento havas sencon. Sed kion diri pri la *-i-* en *Francio*? Certe ne ekzemplo, kiun ni povas uzi en nia reklamado!

Mi foje aŭdas la kritikon, ke la sufikso *-uj-* havas tro da signifoj en Esperanto. Nu, ĝi ja havas tri malsamajn signifojn – kaj tamen, multe malpli ol *-io*, kiu kondukas vere ĥameleone en Esperanto. *-io* foje estas uzata:

- por la nomo de scienco, ekzemple *astronomio* aŭ *biologio*, kontraste kun la nomo de la sciencisto *astronomo* aŭ *biologo*;
- por la nomo de ĥemia elemento, ekzemple *ejnŝtejnio*, *mendelevio* surbaze de la personaj nomoj *Ejnŝtejno*, *Mendelevo*;
- por la nomo de regosistemo, ekzemple *demokratio* aŭ *monarĥio*, kontraste kun la vortoj *demokrato* kaj *monarĥo*;
- por diversaj aliaj ismoj kaj ecoj, ekzemple *stenografio*, *pederastio* kontraste kun la vortoj *stenografo* kaj *pederasto*;
- kiel unu el la korelativoj;
- (sen la fina *-o*) kiel infinitiva finaĵo de la verbo.

Mi scias, ke multaj esperantistoj ne

ŝatas *-ujo* pro ĝia baza signifo kiel ente-nujo. Kaj do? Ĉu persona ŝato aŭ malŝato rilate al iu elemento en Esperanto donas la rajton modifi la lingvon – precipe kiam tiu modifo detruas la logikon de unu el ĝiaj sistemoj? Cetere, mi mem uzas *-ujo* multe pli ofte en landonomoj ol en vortoj kiaj *laktujo*, *sukerujo* ktp., do por mi tio estas ĝia ĉefa signifo.

Aliaj esperantistoj kontraŭstaras la finaĵon *-ujo* pro etnismaj kialoj. Ili argumentas, ekzemple, ke ilia lando ne nomiĝu *Hispanujo*, ĉar tie loĝas ne nur hispanoj, sed ankaŭ katalunoj, eŭskoj kaj aliaj. Laŭ ili, tiu problemo malaperas, se la lando nomiĝas *Hispanio*. Ĉu vere? Al mi tio ŝajnas nura ĵonglado per vortoj, pli precize per sufiksoj: provo solvi politikan problemon per manipulado de la lingvo. Farante tion, oni neniel ŝanĝas la situacion de la katalunoj kaj eŭskoj, sed oni ja terure fuŝas la regulecon de Esperanto.

Per la uzo de *-i-* oni forglitas de la facila analizebleco, kiu estas ĉefa trajto de Esperanto, al nedisigeblo simila al tiu, kiu regas en la nature evoluintaj lingvoj. Certe, iuj neregulaĵoj jam ekzistas en Esperanto: pensu pri la serioj *redakti*, *redaktoro*, *redakcio*, kaj *poeto*, *poemo*, *poezio*. Tiuj tri-vortaj serioj evidente havas komunan fonton, sed la elementoj ne povas esti disigitaj; efektive la lasta konsonanto de la radiko eĉ estas modifita. Tiuj ekzemploj, bonŝance, rilatas nur al unuopaj vortoj, kaj do ne havas sekvojn por la baza funkciado de Esperanto. La situacio estas multe pli serioza, kiam tia neanalizebleco trafas tutan sistemon, t.e. la sistemon formi la landonomojn.

(daŭrigo en pĝ. 18)

Learning by reading

After your initial study of Esperanto (using a textbook, correspondence course, lernu.net, in a class) the most important thing you can do to master the language is to actively engage with it in some way. There are many ways to do this today—communication via Internet (IM, e-mail, Facebook, Skype), participation in a local group if you happen to live in an area with other Esperanto speakers, reading, and writing. There are also some learning materials specifically designed to move you to a higher level of skill with Esperanto, such as the classic *Paŝoj al Plena Posedo* by William Auld (relatively advanced, and not for the faint of heart!), or *Kunvojaĝu* by Paul Gubbins, perhaps better suited for newer Esperanto students.

If you like to read, I would suggest that you spend some time doing that... and reading not just from a textbook, but from a variety of sources. The sooner you begin reading real Esperanto texts, the sooner you'll confront some of the problems people have learning the language, and you'll begin to find the answers to these problems.

Let's look at a paragraph from *Koro* by Edmondo de Amicis, a children's book translated from Italian in 1936:

LA UNUA TAGO DE LA LERNOJARO *la 17an, lunde.*

*Hodiaŭ estas la unua tago de la lernejo. Forpasis kiel sonĝo la tri monatoj da lib-
ertempo, en la kamparo! Mia patrino, hodiaŭ matene, kondukis min al la "Sek-
cio Baretti" por enskribigi min en la trian
klason: mi rememorpensis pri la kamparo*



Lee MILLER

Lee has taught for over a decade at the North American Summer Institute of Esperanto (NASK). He lives in Columbia, Missouri.

lamiller@centurytel.net

*kaj iris malbonvole. En ĉiuj stratoj svar-
mis knaboj; la du librejoj estis plenplenaj
de patroj kaj patrinoj, kiuj aĉetis tornis-
trojn, paperujojn kaj kajerojn; antaŭ la
lernejo amasiĝis tiom da homoj, ke la
lernejservisto kaj la urba gvardisto devis
pene klopodi por ke la enirejo estu libere
alirebla. Proksime de la pordo, mi sentis
ektuŝi mian ŝultron: estis mia instruisto de
la dua klaso, ĉiam gaja, kun siaj ruĝaj,
distaŭzitaj haroj, kiu diris al mi: – Do,
Henriko, ni estas disigitaj por ĉiam. – Tion
mi jam sciis; tamen tiuj vortoj malĝojigis
min. Ni eniris penade. Sinjoroj, sinjorinoj,
popolaninoj, laboristoj, oficiroj, avinoj,
servistinoj, tenante la knabojn per unu
mano kaj kun la promociolibreto en la
alia, plenigis la enirĉambron kaj la ŝtupa-
rojn zumante tiel, ke kvazaŭ ŝajnis oni
eniris en teatron. Mi revidis kun plezuro
tiun grandan, teretaĝan ĉambregon, kun
la pordoj de la sep klasoj, kiun mi trairis,
dum tri jaroj, preskaŭ ĉiutage.*

The story here is simple, but the language actually isn't completely simple. If you have just studied Esperanto at the beginner level, there are probably words you don't recognize, some grammar you don't quite understand, and some other words that seem familiar but you can't quite figure out. The first thing to do is read through it and see if you understand the "gist" of the story—do you know

what the main idea is? Do you understand what's happening? And for any words you don't know, can you make an educated guess from the context?

Here are some of the words that you might not know: *sonĝo, kondukis, Sekcio, svarmis, tornistrojn, kajerojn, amasiĝis, klopodi, distaŭzitaj, penade, zumante*. Can you figure out the meaning? If not, you're going to need to check a dictionary... but not as you read through the first time. Read for meaning in a general way at first, then go back a second time and look up the words you don't know.

Remember that you'll need to look for the root form of the word, so *kondukis* will be under *konduk/i*, *amasiĝis* will be under *amas/o*, *penade* will be under *pen/i*, *distaŭzitaj* will be under *taŭz/i*, and so forth. You'll need to know that *-iĝ-* and *-ad-* and similar word parts are suffixes, while *dis-* is a prefix.

To analyze a word like *distaŭzitaj* you'll need to know the meanings of *dis-*, *taŭz/i*, the word ending *-it-*, the word ending *-a*, and the function of *-j*.

To help you along: the verb *taŭzi* means "to rumple or dishevel". *Dis-* means "apart" or "scattered". And *-itaj* taken together is a past tense, passive, plural adjective. So the word means his hair was "rumpled all over the place."

It might be a helpful strategy for you to keep a notebook or a computer document in which you have a running list of new vocabulary.

Another thing that's immediately apparent in this paragraph is the large number of compound words. This is a constant feature of both spoken and written Esperanto: words are formed out of combinations of other words and word-

parts. So, for example, here we find:

lerno-jaro
for-pasis
liber-tempo
kamp-aro
en-skrib-igi
re-mem-ej-serv-pensis
mal-bon-vole
libr-eroj
plen-plenaj
paper-ujojn
amas-iĝis
lern-ej-serv-isto
en-ir-ero
al-ir-eblo
ek-tuŝi
dis-taŭz-itaj
dis-ig-itaj
mal-ĝoj-igis
promocio-libr-eto
plen-igis
en-ir-ĉambron
ŝtup-arojn
ter-etaĝan
ĉambr-egon
tra-iris
ĉiu-tage

As you become more familiar with Esperanto, you'll begin to automatically see and analyze these words into their parts to determine the meaning. But as a beginner the process is a little less automatic and requires some deliberate thinking on your part. And in general you won't find the compound forms in a dictionary—you'll typically need to find the meanings of the parts to determine what a compound word itself means.

Remember too that often through Esperanto literature you encounter other cultures and other time periods. This

story gives a glimpse of the first day of school in Italy, in the early part of the 20th century. What is a *lernejservisto*? Why would the *urba gvardisto* be at a school? What exactly is a *promocio-libreto*? These are time- and culture-specific concepts that might not fit with your usual ideas of an elementary school.

Let's look at one more thing in this paragraph: the use of the n-ending, often called the accusative. The n-ending is used most often to mark a direct object—that is, something acted upon. In the English sentence *John hits Bill*, Bill is the direct object, because John does something to him. Here are some examples from our text:

*mia patrino kondukis min
kiuj aĉetis tornistrojn
Tion mi jam sciis
tiuj vortoj malĝojigis min
mi revidis tiun grandan,
teretaĝan ĉambregon*

Do you see how in each phrase something acts (the subject), and something is acted on (the direct object)?

Another use of the n-ending is with some prepositions, such as *en*. Here are two examples:

*por enskribigi min en la trian klason
kvazaŭ ŝajnis oni eniris en teatron*

En la tria klaso, without the n-ending, simply means “in the third grade”. *En la trian klason*, with the n-ending, changes the meaning of *en* to “into”: “to enroll me into the third grade”. *Oni eniris en teatro*, without the n-ending, would mean “Someone was in the theater, and entered something”, whereas with the n-ending the meaning is “someone entered into the theater” (that is, someone was outside the theater and went in). Watch for this distinction as you read other Esperanto material—it's important to the meaning. *La hundo saltis sur la tablo* means “The dog was on the table, jumping”, whereas *La hundo saltis sur la tablono* means “The dog jumped onto the table”. Being aware of this difference will help you understand the specific meaning of what you're reading. ★

La nova modo (daŭrigo de pĝ. 15)

Mi rimarkas kun plezuro, ke *-ujo* komencas iometete reaperi. Interalie, unu el la estraranoj de UEA lastatempe ekuzis ĝin, konvinkite de la argumentoj en la libro *Rusoj loĝas en Rusujo*. Multaj esperantistoj efektive komprenas, ke *-ujo* estas pli logika ol *-io*, sed ili hezitas mem uzi ĝin, ĉar ili trovas ĝin “eksmoda”. Nu, modoj povas ŝanĝiĝi, ĉu ne? Se vi opinias, ke *-ujo* estas pli bona ol *-io*, kuraĝu ekuzi ĝin! Estu en la fronto de la nova modo!

Por pli da informo, vidu:

- *Rusoj loĝas en Rusujo: landonomoj en Esperanto*. Havebla de UEA kaj ĉe <http://bonalingvo.org/docs/rusojenrusujo.pdf>
- *Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto: kun kompleta listo de landoj kaj landanoj*. Havebla de UEA, kaj elŝutebla ĉe <http://bonalingvo.org/docs/klarigoprilandonomoj.pdf>
- *La landonomoj – pli simplaj ol vi supozas!* 37-minuta parolado spektebla ĉe: <http://www.vimeo.com/5030540>. ★

Ke-frazoj tiaj, ke tabelvortoj priskribiĝas

Oni ordinare renkontas la tabelvortojn kaj ke-frazojn dum la unuaj lecionoj de enkonduka Esperanto-kurso. Ĉar la bazaj uzoj de *tio*, *kio*, kaj *ke* ne prezentas grandajn malfacilaĵojn, eĉ novaj esperantistoj povas senpene elbuŝigi frazojn kiel *Kio estas tio?* kaj *Mi opinias, ke Esperanto estas utila*. Ekzistas tamen multaj uzoj de tabelvortoj kaj ke-frazoj kiujn oni ne ĉiam traktas en enkonduka kurso. Inter tiuj uzoj estas la priskribo de tabelvortoj per ke-frazoj. Ĉi-sube, mi klopodos klarigi kiel kaj kiucele oni uzas ke-frazojn kiel priskribojn de la tabelvortoj *tiel*, *tia*, kaj *tiom*.

Per kombinoj de *tiel* kaj ke-frazoj, oni povas pliprecizigi adjektivojn, adverbojn, kaj verbojn. Se taso da teo kiun oni proponis al vi estis netrinkeble varma, vi povas diri, *La teo estis tiel varma, ke mi ne povis trinki ĝin*. Se la rapido de kuranto igas lin preskaŭ nevidebla, oni povas diri, *Li kuras tiel rapide, ke oni apenaŭ povas vidi lin*. Pri iu, kies plorado igis aliulojn kompati lin, eblas diri *Li tiel ploris, ke ĉiuj kompatis lin*. Menciindas, ke kiam *tiel* rilatas al verbo, la tabelvorto ofte troviĝas tuj antaŭ *ke*: *Li ploris tiel, ke ĉiuj kompatis lin*.

Oni uzas ke-frazojn kiuj priskribas la tabelvorton *tia* por indiki iom kompleksajn ecojn de substantivoj. *Tia* kutime staras aŭ antaŭ la substantivo al kiu ĝi rilatas, aŭ antaŭ *ke*. Ŝtormo, pro kiu homoj ne elvenis el siaj domoj, povus esti *tia ŝtormo, ke ĉiuj timis iri eksteren*. Se ius akĉento estas malfacile komprenebla, oni povas diri *Lia akĉento estas tia, ke oni tre malfacile komprenas lin*.



Steven CYBULSKI

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

stcybulski@gmail.com

Priskribo de la tabelvorto *tiom* per ke-frazo estas iafoje utila kiam oni volas doni informojn pri iu kvanto. Se vi restos sata la tutan tagon ĉar vi manĝis tiel grandan kvanton da manĝaĵo, *vi manĝis tiom, ke vi ne malsatiĝos ĝis morgaŭ*. Se en iu restoracio neniu tablo estas libera, ĉar tiel multe da homoj tie manĝas, en tiu restoracio manĝas *tiom da homoj, ke ĉiuj tabloj estas okupitaj*. ★

La plej nova “poŝtsekreto”

Mi emas favorigi novajn instruistojn al mi antaŭ ol malkaŝi, ke mi parolas


Esperanton...



por ke la ŝoko estu des pli GRANDA.

Kontribuu viajn anonimajn poŝtsekretojn en Esperanto! <<http://zozafish.blogspot.com>>

New in the E-USA bookstore



RAKONTOJ

Edgar Allen Poe

Ses rakontoj, kiujn tradukis Edwin GROBE: *La Murdoj de Kadavrejo-Strato*, *La Mistero de Marnjo Roĝeto*, *La Barelo de Amontilado*, *La Denuncema Koro*, *Manuskripto Trovita en Botelo*,

kaj *La Falo de Uŝer-Domo*. Antaŭ jaroj, ĉiu rakonto estis havebla unuope ĉe ni, sed nun kelkaj tiuj estas elĉerpitaj. Malmola bindaĵo. 134 paĝoj. 2010. Usono. **\$9.30**

Items in the bookstore can be ordered by mail from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530** or online from <http://esperanto-usa.org/retbutiko>.

More complete descriptions can be found at our website. If a title is out of stock, you can have the online bookstore notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.

Nova poemaro el Indonezio

Sub la vasta ĉielo de Yohanes Manhitu

[De niaj amikoj en la suda duonsfero venas la jena anonco, pri nova poemaro ĵus eldonita en Aŭstralio. —Red.]

Ĉi tiu nova poemaro enhavas 140 poemojn kaj 20 poemetojn verkitajn esperantlingve en Indonezio. Ili temas pri insulara vivo, amo kaj diversaj belajetoj.

La libro estis eldonita per financa subtenado de la Oceania Komisiono de UEA. La investo estos redonita al la fonduso post vendado de la libroj. Vi estas invitata mendi ekzempleron de <http://mondeto.com>.



Pri la verkisto: Yohanes Manhitu naskiĝis dum 1976 en Indonezio, kaj kreskis en Orienta Timoro, kie li eklernis la tetuman lingvon (de Dilio). Li finis sian universitan gradon ĉe la Fako de Anglalingva

Instruado de la Universitato Nusa Cendana. Post kiam li finis studadon, li laboris unu

jaron kiel tradukisto kaj interpretisto ĉe la oficejo de *United Nations High Commissioner for Refugees (UNHCR)* en Kupang, Okcidenta Timoro. Nun li loĝas en Jogjakarto kaj laboras tie kiel fremdlingva instruisto. Kiel sendependa tradukisto, li tradukas el anglaj, hispanaj, francaj, portugaliaj kaj tetumaj fontoj. Plue, li kelkfoje verkas artikolojn pri lingvo kaj kulturo. Li daŭras lerni enlandajn lingvojn – precipe la davanan kaj la indonezian lingvojn, kaj dediĉas multan atenton al latinidaj lingvoj kaj la internacia lingvo Esperanto. Li jam verkis kelkajn librojn en diversaj lingvoj, sed *Sub la vasta ĉielo* estas lia unua originala poemaro en Esperanto.

Yohanes Manhitu,
Sub la vasta ĉielo.
Mondeto, Candelo,
Aŭstralio, 2010.
Poemaro, 161 pĝ.
\$AUS 17 + franko.

